Justinus Kerner,

# La plej riĉa princo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Siajn landojn laŭdegante
|:De l' princaro konsili':|[2]
|:Sidis iam en la halo:|
|:De l' germana imperi'.:|

"Ja belegas mia lando,"
|:Jen la princo de Saksi'.:|
|:"Multe da arĝenta erco:|
|:En la montoj havas mi.":|

"Belas ankaŭ mia lando",
|:La Rejn-princo gloras sin.:|
|:"Ora greno en la valoj,:|
|:Sur la montoj nobla vin"".:|

La sinjor' de Bavario
|:Diris: "Riĉas ankaŭ mi.:|
|:Laŭ trezoroj estas riĉa:|
|:Mia lando ne malpli.":|

Eberhardo, la barbulo,
|:Virtemberga la sinjor',:|
|:Diris: "Ja en mia lando:|
|:Estas nek arĝent' nek or'.:|

. . .

Justinus Kerner,

# Der reichste Fürst

Preisend mit viel schönen Reden
|:Ihrer Länder Wert und Zahl,:|
|:Saßen viele deutsche Fürsten:|
|:Einst zu Worms im Kaisersaal.:|

"Herrlich", sprach der Fürst von Sachsen,
|:"Ist mein Land und seine Macht;:|
|:Silber hegen seine Berge:|
|:Wohl in manchem tiefen Schacht.":|

"Seht mein Land in üpp'ger Fülle,"
|:Sprach der Kurfürst von dem Rhein,:|
|:"Goldne Saaten in den Tälern,:|
|:Auf den Bergen edler Wein!":|

"Große Städte, reiche Klöster",
|:Ludwig, Herr zu Bayern, sprach,:|
|:Schaffen, dass mein Land den euren:|
|:Wohl nicht steht an Schätzen nach.":|

Eberhard, der mit dem Barte,
|:Württembergs geliebter Herr,:|
|:Sprach: "Mein Land hat kleine Städte,:|
|:Trägt nicht Berge silberschwer;:|

. . .

---

[2] aŭ:
|:La princara konsili'|:

Sed ĝi tamen estas riĉa,
|:Trezoregon havas ĝi::|
|:Ke al subularo mia:|
|:Ja konfidi povas mi.“:|

Diris la sinjor' Saksia,
|:De l' Rejnland', de Bavari':|
|:"Vi barbula graf', plej riĉa:|
|:El ni ĉiuj estas vi!":|

*Traduko de la Germana poemo "Der reichste Fürst" de* Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-929-1864 (2013-10-09 18:59:42)*

*La poemo estas kantebla la jena melodio:* `http://www.politikundunterricht.de/2_3_01/M_hymnen.htm#fuerst`. *Tie ĝi estas ankaŭ aŭdebla. Ĝi estas la Virtemberga himno. La muziknotoj troviĝas ankaŭ en* `http://www.volksliederarchiv.de/notenpdfs/1999.pdf`.

Doch ein Kleinod hält's verborgen;
|:Dass in Wäldern, noch so groß,:|
|:Ich mein Haupt kann kühnlich legen:|
|:Jedem Untertan in Schoß.":|

Und es rief der Herr von Sachsen,
|:Der von Bayern, der vom Rhein::|
|:"Graf im Bart! Ihr seid der Reichste!:|
|:Euer Land trägt Edelstein!":|

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21).*

*Arg-929-1863 (2013-10-17 09:07:31)*

*Pri la poemo kaj la verkinto vidu la retejojn* `http://ingeb.org/Lieder/preisend.html`, `http://de.wikipedia.org/wiki/Preisend_mit_viel_schΓynen_Reden` *kaj* `http://www.youtube.com/watch?v=eGGLN-zrTd0`. *Ĝi estas kantebla laŭ la melodio de la germana popola kanto "In des Waldes tiefsten Gründen", kiun verkis en 1799 Christian August Vulpius, la bopatro de J. W. v Goethe. Pri Chr. August Vulpius vidu la retejon* `http://www.lieder-archiv.de/texte_vn-christian_august_vulpius-pid6662.html`.